

& Joe Hill:

< Ripete 9 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Alfred Hayes. Komponis Earl Robinson. El angla tradukis Jomo Ipfelkofer. Joe Hill (1879-1915) estis sveda enmigrinto en Usono. Tie li kontraŭbatalis la ekspluatadon de la laboristaro farab la estroj de militaj fabrikoj. En ŝajnproceso li estis mortkondamnita pro "murdo". Liaj lastaj vortoj antaŭ la ekzekuto (la 19-an de novembro 1915) estis: "Ne funebru pri mi - organizu vin!". Klarigoj (*): '1 Ellasiĝis akuzativa finaĵo. >

(#Melodio:

<:37> (So /Mi So So oSo Mi So So o;So La do do La do o; So do do do oSo Ti La So o;Mi Re Re Ti Ti So o; Mi So So La So Do o)×7)+

(&Strofoj:

'1 Last/nokte vidis mi Joe Hill*, ; En song' aperis /li. ; Mi diris: "Ĉu ne mortis vi?" (; – Neniam mortis mi.)×

'2 Ili ekzekutis vin, Joe Hill, ; Timigite diris mi. ; Nu jes, - respondis li kun rid', ; Sed tamen vivas mi!

'3 Lu* kupro-estro murdis vin, ; Mortpafis vin, Joe Hill! ; La korpo mortis, - jesis li, ; sed tute ne l' anim'!

.....

'4 Li staris apud mia lit' ; Kaj ĝoje diris mi: ; Do, ne trafite, la spirit' ; Ĝi vivos plu sen tim'!

'5 Neniam mortis de Joe Hill ; La memor' al l' subpremad'. ; Subtenas laboristojn li ; En ilia batalad'.

'6 En tuta mond' , - al mi li krias ; Vi ĉie trovos min, ; Kie strikas, luktas, liberiĝas ; Frato kaj frat'

'7 Lastnokte vidis mi Joe Hill, ; En song' aperis li. ; Mi diris: "Ĉu ne mortis vi?" ; Neniam mortis mi.)